Sept. 37

Vol

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

# THE AMERICAN ESPERANTIST

LA AMERIKA ESPERANTISTO.

THE MONTHLY BULLETIN OF THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA
LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTO-ASOCIO DE NORDA AMERIKA.
Central Office 1517 H Street, N-W., Washington, D.C. Centra Oficejo.

VOL. No.10. 10¢ per copy $1 per year Anywhere. September 1937.

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

**Esperanto Association of North America** 1517 H Street, N. W., Washington, D. C.

MEMBERSHIP RATES - FIXED AT 28th CONGRESS

**M** - **EANA and IEL**, with "American Esperantist" .............................. $1.50
**MJ** - **EANA** - **IEL**, with "American Esperantist" and Jarlibro .............. 2.50
**MA** - **EANA and IEL**, with "AE" Jarlibro and " "Esperanto Internacia" (Monthly)... 4.00
**MAH** - **EANA** " **IEL**, with "AE" Jarlibro and weekly "Heroldo de Esperanto" ........ 6.50
**MS** - **EANA** - **IEL** - Jarlibro, may receive both weekly and monthly publications, or may elect to receive instead of the weekly "Heroldo de Esperanto" a selection of book premiums from an already published list - ask for it ................... 8.50

The Jarlibro (Yearbook) is a directory of Esperanto Delegates in all parts of the world, Esperanto organizations, publications, and all sorts of information necessary to any one wishing to " B E U P " on Esperanto affairs.

**Always CARRY THE GREEN STAR-the Magic Key to Human Hearts-the Esperanto Emblem in the buttonhole.** Every Esperantist should proudly carry it. Green star with Golden "E" and golden protectors on points. Choice, screwback 40¢, Safety catch 50¢. Esperantists and Friends of Esperanto. W E A R T H E M.

## LIDIA ZAMENHOF.



Granda kaj ne ofta favoro de la sorto estas, se infano kun fervoro kaj sukceso daŭrigas la verkon de sia patro. D-ro Zamenhof, la aŭtoro de la Esperanto lingvo, ricevis ĉitiun favoron, ĉar lia filino Lidia, kies portreton ni prezentas ĉi tie, apartenas al la plej entuziasmaj kaj senlacaj pioniroj de Esperanto. Lidia Zamenhof jam kiel malgranda knabineto ellernis Esperanton en la gepatra domo, kaj fininte siajn studojn ĉe la jura fakultato en la universitato de Varŝavo, kun tuta animo kaj energio dediĉis sin al la laborado por Esperanto. En la unua tempo sia laborkampo estis la urbo Varŝavo, kie en la societo "Konkordo" dum kvin jaroj ŝi instruis Esperanton. En la jaro 1932 f-ino Zamenhof elektis novan labor-sferon kiel internacia instruistino de la Cseh-metodo, en la Cseh Insituto. Post kelkmonata kursgvidado en Svedujo ŝi transiris al Francujo, kaj tie ŝi laboras jam de kvar jaroj, zorge kaj bonege helpata de gesinjoroj Borel en Lyon, kaj de aliaj geamikoj. Kiel vera apostolino de la mond-lingvo f-ino Zamenhof varbis kaj edukis milojn da novaj Esperantistoj, kaj sia agado estas glora triumf-vojo de nia lingvo. Ŝi disvastigas ne nur la lingvon de sia patro. Ankaŭ pro liaj ideoj ŝi fervore laboras. En Majo (1937) f-ino Zamenhof en la internacia konferenco "Esperanto en la Moderna Vivo" en Parizo prezentis raporton pri "Humanismo" kaj faris demonstracion de la Cseh-metodo. Kaj tie ŝi gvidis siajn lastajn kursojn en Eŭropo, komencajn kaj progresigajn kursojn, kaj pedagogian kurson por Cseh-metodaj instruistoj, ĉar poste ŝi forvojaĝos al Usono, por fari tie parolad-vojaĝon kaj Esperanto-kursojn je la invito de la amerika Bahaista asocio. Espereble ŝi multe vigligos nian movadon en Ameriko per sia oratora kaj pedagogia talento. (El "La Praktiko")

## Financa Rezolucio

prenita okaze de la 30-a kongreso de E.A.N.A, Washington, D.C., 1-3 Julio, 1937.

Ĉar dum la lastaj kvar jaroj, kaj precipe dum la lastaj du jaroj, E.A.N.A. faris firman kaj fine sukcesan klopodegon por atingi honorindan likvidon de ĉiuj ŝuldoj de la asocio faritaj dum antaŭaj jaroj:

Kaj ĉar la sukceso de tiu ĉi klopodo estas atingita pro la malavara donacado de la membraro, sed ankaŭ parte pro la sinteno helpema kaj komprenema de la kreditoroj, kiuj en la plej multaj okazoj konsentis al fina likvido por malpli ol la tuta bonhavo:

Kaj ĉar la centra oficejo de EANA estis en Washington'o, D.C., de Oktobro 1933, kaj ĝia adreso ne estis sekreto (1517 H. St., N.W.) sed estis konata ĉiam pere de la propra oficiala gazeto, kaj en la jarlibroj de UEA kaj IEL, —

La jena rezolucio estis akceptata de la 30-a jara kongreso de EANA:

Ke de nun EANA ne plu rekonu ŝuldo-postulojn de iu ajn speco kiuj ne estis konataj al la estraro aŭ oficisto de la nacia asocio, kaj bazitaj sur negocoj aŭ transakcioj faritaj de antaŭa administracio.

Kaj plue estas la decido ke la estraro de EANA daŭrigu la principon ke la gvidado de la asocio estu sur "pay as you go" (senŝulda funkciado) bazo, escepte en sendanĝera maniero kiam temas pri mendo de malgrandaj aĉetoj aŭ servoj, kiuj tamen estu pagataj unu monaton post ricevo de ajoj aŭ servoj.

# # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # #

## A NEW DEPARTMENT — "LIBROLEGANTOJ."

Of the several ways in which a knowledge of Esperanto may be utilized for profit or pleasure, the one most universally available for Esperanto students in America is READING the Esperanto publications. This path opens in two directions, to the magazines issued in "nia lingvo," and to the more permanent Esperanto LITERATURE in books and booklets.

To encourage and promote the more extensive reading of good Esperanto books, EANA has now organized a new department or service. Any member of EANA (or one of his immediate family) who has even well started in the profitable habit of reading, is earnestly invited to enroll himself early as a member of the "EANA-Rondo de Librolegantoj." Milestones of progress (certificates or little diplomas) do count for something. They help to keep up morale and steadiness of purpose. And they give to you a more definite place in the movement, a place in association with others.

Just write to Direktoro de EANA-Rondo de Librolegantoj, Box 138, Benjamin Franklin P.O. Sta., Washington, D.C. Send with your letter a list of the Esperanto books and booklets (other than mere lesson books) which you have read up to date — naming the number of pages in each. And don't forget to enclose SIX CENTS in stamps. (The service is to be free, but must be self-sustaining.)

If your letter shall show that you have read even 100 pages of Esperanto literature, your letter (together with your 6 ¢ ) will bring you a card enrolling you as a "one-star member of the EANA-Rondo de Librolegantoj." If you show over 500 pages, you become a 2-star member; over 1,500 pages, a 3-star member; over 3,000 pages, a 4-star member; over 5,000 pages, a 5-star member. It is suggested that both old-timers and new recruits enroll early. For beside satisfaction to yourself, you are encouraging others in the good reading-habit. Report now what you have already read, (lists will be confidential.) You can work for the higher degrees later, at your convenience.

Mr. Kenneth F. Rogers of Washington city has accepted the post of Director of this service. Mrs. Fannie McDowell of Washington will serve as Assistant Director.

These leaders will also mature plans gradually by which they can assist members of the "Rondo" in selecting, purchasing, or exchanging Esperanto books. (With each letter of general inquiry, please remember a 3-cent stamp. Service free but self-sustaining, is the motto.)

The first 100 to enroll, no matter in what grade, will be "charter members" of the "Rondo."

# # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # #

La Lyon(Francujo) Universitata Esperanto-Klubo(kun pli ol 500 membroj),kiu dum la lasta lernejojaro,precipe dank' al f-ino Lidia Zamenhof kaj s-ro Levin,sukcesis varbi 130 novajn anojn...La ĉiutaga Lyon'a gazeto "Lyon republicain",kiu antaŭ kelkaj monatoj publikigis Esp.-kurson,nun enhavas ĉiusemajne Esp.-rubrikon.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

"PATRONOJ DE E.A.N.A."

Ĉar la ĝeneralaj enspezoj de EANA por la jaro fiska 1936-37 malsuperis la necesajn elspezojn por normalaj servoj al la membraro, la ferma kunsido de la Jubilea Kongreso de EANA en Washington'o, julion je la 3-a, zorge pritraktis la financan problemon de la venonta jaro. Kvar eblaĵoj estis diskutataj. Aŭ (1-e) fidi sole al esperata pligrandiĝo de la membraro. Sed tio estus vetludo kontraŭ necertaĵo. Aŭ (2-e) plialtigi la ĝeneralan membrokotizon. Sed tio estas nedezirinda. Krome, fari tuj tion, sen antaŭanonco de proponata ŝanĝo en la Statuto, estus kontraŭkonstitucia. Aŭ (3-e) malpligrandigi la paĝnombron de Amerika Esperantisto. Sed la plimulto de la kongresanoj forte opiniis tion neoportuna.

Aŭ (4-e) inviti interesitajn membrojn (kiuj kaj povas kaj deziras) anonci sin kiel PATRONOJ DE E.A.N.A., kiuj meritos honoran lokon per volonta pago de po $10.00, anstataŭ la laŭregula $1.50 membrokotizo. Tiu ĉi lasta plano estis plenkonsente adoptita, kiel la plej oportuna. Kaj dekduo da Patronoj sin anoncis tuj en la kunveno. (Unu plua sinanonco alvenis per unua respondpoŝto.)

Aspekton de la afero bonhumoran, preskaŭ ŝerceman, kaŭzis la decido de kelkaj patroniĝantoj elekti por si, ne siajn laŭvicajn numerojn en la patronolisto, sed aliajn numerojn kiuj por jena aŭ jena kialo plaĉis al ili. Tio devis preskaŭ konfuzi la Sekretarion; kaj se neintenca eraro estos trovita en la suba listo, bonvolu pardoni! Kiuj nun fariĝos baldaŭ la volontuloj kiuj konsentos plenigi la ankoraŭ neokupitajn lokojn de Patronoj "n-roj 7, 8, 12, 15, 16" ?

Ĝisnuna listo de Patronoj

1. F-ino A.J.Kruka
2. Prof. F. Tomich
3. D-ro Cecil Stockard
4. S-ro E.G.Dodge
5. D-ro A.M.Schwager
6. Prof. A.I.Rugus
7. (??)
8. (??)
9. S-ro Wm. B. Patzer
10. S-ro S.M.Quraishi
11. F-ino Virgie Vail
12. (??)
13. F-ino Julia M. Leach
14. (amiko nomkaŝanta)
15. (??)
16. (??)
17. S-ro Oscar Muenzer
18. S-ro F.H.McMann

Krome al la supraj Patronoj, ni tre danke mencias, kun honoro, la subajn gesamideanojn kiuj malavare jam dum la kongresa kunveno ofertis donacojn po $5.00.--D-ro Lehman Wendell, S-ro Louis Sormani, F-ino Ann E. Beatty, S-rino Hedwig Muenzer, S-ro Harry M. Furber, S-ro H.H.Harvey, S-ino C.J.Walter.

Kiu ajn plua membro deziras fariĝi Patrono de E.A.N.A., bonvolu sin anonci al la Sekretario, aŭ al la Estro de la Financa Komitato. Jupli multaj la tielaj subtenantoj, despli bona kaj vastskala povos esti la laboro de EANA por "nia afero."

# # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # # #

IMPORTANT ANNOUNCEMENT. "THE ESPERANTO HOME-STUDENT."

We are very happy to announce that we are now prepared to furnish, in any desired number of copies, that extremely popular lesson book for beginners, "The Esperanto Home-Student," by James Robbie. This is the ninth edition, revised and enlarged, of a work which has already been sold in more than 50,000 copies -- chiefly in Great Britain, but also in America.

An added satisfaction is that part of the 1937 new edition has been printed especially for American use, with all prices in American money and with notices of our E.A.N.A. on cover pages.

This is a book which will fill a long felt want. There will always be a demand, of course, for a very brief beginners' outline and for keys, obtainable for a dime or for a nickel. There will also be a demand for complete grammars, necessary for scholarly advanced students. Yet between those outer limits, there has long been felt to be for us in America a sort of gap, which now is happily filled by the Home-Student.

Single copies and small orders, 20¢ each, postpaid. Ten or more to one address, 18¢ each. Fifty or more in one shipment, 16¢ each. (Send remittance to EANA, 1517 H-St., N.W., Washington, D.C.) The "Esperanto Home-Student" is of size 7 by 4 1/2 inches, and includes 62 pages beside the stiff green cover. Pronunciation, grammatical rules, and word formation are presented in an orderly fashion, with very simple explanations such as anyone can understand. And there are 27 Exercises, each accompanied by a Key. The book is therefore specially valuable to the prospective student who must be his own instructor.

But we also may emphasize that in the opinion of many teachers, the presence of "keys" to all exercises is very helpful even when the book is used as a textbook in classes. For this is a feature which greatly reduces the number of elementary questions which pupils must ask of the instructor during the class hour. And so it leaves the class period more free for other matters -- such as practice in elementary conversation.

Early orders indicate what we expect-a wide demand for this well tested little book

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

30an UNIVERSALA KONGRESO de ESPERANTO, 30an Julio-6a Aŭgusto 1938.
KONGRESEJO,UNIVERSITY COLLEGE, UNIVERSITATO de LONDON, ENGLAND.
Secretario,C.C.Goldsmith,Heronsgate,Rickmansworth (Herts), England. Oni nun presas belajn Kongresajn glumarkojn-prezo por kvindek,du respondkuponoj.
La nombro de Kongresaj biletoj jam vendita indikas ke koncervativa antaŭ kalkulo de nombro da partoprenantoj estos almenaŭ dumil. ESTU PRETA.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

PIKNIKOJ. The Esperanto Clubs of Cleveland and Akron,Ohio,held a very enjoyable joint picnic near Breekville,Sunday July 24th.They remained through the twilight-vieing with the songbirds,sending sweet strains of Esperanto songs through the depths of the forest. UNUECO ESTAS FORTO.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

THE ANNUAL Picnic of the Washington Esperantists,guests of Samideano R.Heman, on his beautiful lawns-and swimming hole,at Cabin John,Md., was enjoyed by a large delegation,Sunday,August 8th. Eats,Games,Songs and Music. VIVU la HEMAN.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

PENNSYLVANIANS.Fervorulo Conrad Fisher of Meadville,one of our most enthusiastic workers,wishes to organize all the Pennsylvania Esperantists,and will be grateful to anyone furnishing him with data relative to the old Penn'a Esperanto Association.Also,he has interested one of the "Big-time"singers -on a national network,in the singing of Esperanto songs.If you have words and music,or know of a publisher of Esperanto songs and music,write Mr Fisher.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## ESPERANTO EN LA LERNEJON -

## ĈU NI ESTAS PRETAJ ?

Dum la nuna tempo oni multe parolas kaj skribas, ke oni devus enkonduki Esperanton en la lernejojn. La ideo estas bonega, sed en la praktiko la problemo ne solviĝas tiel facile.

La lernejestroj ne enkondukas nian lingvon (ekzistas esceptoj) en la lernejojn se la ĝenerala publiko ne deziras tian enkondukon aŭ eĉ ne estas informita pri la afero.

Antaŭ cent jaroj oni enkondukis gimnastikadon en la germanajn lernejojn. Sed la gepatroj protestis, ĉar ili ne estis informitaj pri la valoro de la nova fako. Kial la infanoj gimnastiku en la lernejo, kiam ili povas kuri ĉirkaŭ la domoj ? Kial pagi instruistojn por tia freneza afero ? Pro tro multaj protestoj oni malpermesis la gimnastikadon en la lernejoj . . . ."ĉar ĝi estas malbona por la sano de la infanoj"

Se ĉiuj lernejestroj nun enkondukus Esperanton . . . plej verŝajne denove protestus la gepatroj.(Ni supozu ke ni havus sufiĉe da instruistoj) La gepatroj protestus kontraŭ nia lingva ideo."Kial pagi instruistojn por instruis tian senutilan lingvon?" ili demandus. Kaj baldaŭ oni komencus malpermesi Esperanton . . . . ĉar la ĝenerala publiko ne scias sufiĉe pri Esperanto, aŭ tute ne scias pri la ekzisto de nia lingvo. Do nia ĉefa tasko estas eduki la ĝeneralan publikon pri Esperanto, gajni amikojn por nia afero, krei "publikan opinion" . Estas bone por la lernejaj fakuloj inter niaj samideanoj, klopodi pri la enkonduko de nia lingvo en la lernejojn. Sed samtempe ni ĉiuj devas helpi, per ĝenerala propagando al la vasta tro indiferenta publiko. Do ni ĉiam, kaj ĉie digne kaj inteligente devas varbi kaj propagandi.

Joseph R. Scherer.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

## COMMITTEES AND OFFICERS OF E.A.N.A., FOR THE YEAR ENDING JULY, 1938.

The real work of EANA as an organization -- apart from the individual services of its separate members -- is dependent to a great extent upon its elected officers and upon its standing or annual committees. The list of the committees for the current year is printed below, with the exact mailing address of the Chairman in each instance. You are urged to preserve this issue of Amerika Esperantisto for reference, as the full committee-list cannot be repeated in later issues.

**Executive Committee :**
Joseph R. Scherer, President of EANA, 4474 W. Adams Blvd., Los Angeles, Calif.
E.G.Dodge, elected member of Committee (and acting as Chairman, by request of President)
= 1301 Mass. Ave., N.W., Washington, D.C.
Joseph Leahy, General Secretary of EANA, 1517 H-St., N.W., Washington, D.C.

**Other elected officers :**
Vice-President - James F. Morton, Paterson Museum, Paterson, N.J.
Treasurer - Mrs. Clara J. Walter, 1517 H-St., N.W., Washington, D.C.
Assistant Secretary - Kenneth F. Rogers, Box 138, Benj. Franklin P.O.Sta., Washington, D.C.

**Finance Committee :**
F.H.McMann, Chairman - 169 Hoosick St., Troy, N.Y.
Gerald F. Small, Washington, D.C.
H.B.Hastings, Boston, Mass.

**Membership Committee :**
W.G.Adams, Chairman -- 219 Public Safety Bldg., Seattle, Wash.
Joseph H. Murray, Detroit, Mich. 8198 Chamberlain Ave.,
R.M.Pease, New York City. 463 West St.,

**Propaganda Committee :**
S.C.Eby, Chairman, - 320 East 42nd St., New York City.
Rev. Giles H. Sharpley, Waverly, Iowa.-
(third member to be announced later.)

**Publications Committee :**
H.B.Hastings, Chairman, - Box 250, Boston, Mass.
Joseph Leahy, Washington, D.C.
Mrs. C.J.Walter, Washington, D.C.

**Examinations Committee :**
Prof. Edwin L. Clarke, Chairman (and sole member), - Box 14, Winter Park, Fla.

**Committee on Esperanto in Schools :**
Louis Dormont, Chairman, - 123 East 35th St., Brooklyn, N.Y.
Prof. Gilbert Nickel, Middletown, Del.
Norman A. McQuown, Yale University.

**Committee on Legislation :**
Joseph W. Dubin, Chairman, - 646 Westview St., Philadelphia, Pa.
H.W.Hetzel, Philadelphia, Pa.
Mrs. Beatrice Hayes Podell, Chicago, Ill.

**Committee on visit of Lidia Zamenhof to America :**
S.C.Eby, Chairman, - 320 East 42nd St., New York City.
Mrs. Della C. Quinlan, Brooklyn, N.Y. 70 Columbia Heights,
Miss A.Josephine Kruka, Washington, D.C. 2934 McKinley St., N-W

**Young People's Department :**
Director: George A. Connor, - 30 Perry St., New York City.
Assistant Directors: Thomas Goldman, (Harvard University,)
Miss Philippa Stoneham, (Texas.) 2943 W.French St., San Antonio

**"EANA-Rondo de Librolegantoj" :**
Director: Kenneth F. Rogers, - Box 138, Benj. Franklin P.O.Sta., Washington, D.C.
Assistant Director: Mrs. Fannie McDowell, Washington, D.C.

**Committee on "Friends of Esperanto" :**
Lee D. Stern, Chairman, - 2995 Lincoln Blvd., Cleveland, Ohio.
Armin Doneis, Pharr, Tex.
Fred A. Hamann, Wauwatosa, Wisc.

**Official Statistician :**
Fento Stancliff, - 1106 Big Falls Ave., Akron, Ohio.

**Historian and Conservator:**
H.W.Hetzel, 119 South 37th St., Philadelphia, Pa.
Assistant Historian and Conservator, Miss E. J. Merriam, Boston, Mass.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

PAINLESS SAVING. If a dollar and a half looks like to large an outlay all at once, drop a nickel,dime,quarter-or even a penny-into a box,drawer,etc.,a few times a week. You'll be surprised how soon-and how easily you will have enough to RENEW-or become A Member of EANA. If you have renewed,just keep thinking about the BIG, GRAND TIME to be enjoyed at the 31st KONGRESO in Cleveland next summer,and you'll not miss those few coins-or the occasional smoke you may forget.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

OMISSIONS-OH MY! Due,possibly to the excitement of the 30th Congress,with its galaxy of Youth(and a few not quite so young)beuty and intelligence,we were remiss on three counts,of vital importance-Oh yes,all good Esperantists object to being "the forgotten man".Fervorulo Karlo Germanto,Brooklyn,N.Y.name omitted from list of Congress ticket holders.Honorary President H.W.Hetzel from the list of Warsaw Caravan,and Samideano George D,Gideon,Wilmington,Delaware,from the Honor Roll. Mi tre,tre bedaŭras.I most earnestly hope that you will,in all charity,take into consideration all the circumstances-if you can think of many.ESPERO.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

THE SCEPTICSAYS that Esperanto is an "artificial thing",not organically growing, therefore not worth considering.But this same sceptic willingly uses an artificially built motor car,instead of an organically growing horse,to travel more rapidly and comfortably. (Oh well,he's only a sceptic.)

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

NEKROLOGIO.Kun profunda bedaŭro ni informiĝis pri la morto de Sinjorino Marie Borel,en Lyon,Francujo,la 20an Julio.Al ŝia edzo,S-ro Emile Borel,kaj familio,ni prezentas sinceran kondolencon. (Mr and Mrs Borel are the people mentioned,as the good friends of Lidia Zamenhof-front page.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

"THE STATE",Columbia,S.C. daily,of several dates,tells us of the many addresses being made by Mr Virgil Dibble,Secretary of the Columbia Merchants Association, before many organizations-such as Rotary,Civitan,Pilots,etc.,always with the predominant subject being Esperanto. After outling the necessity for a second language,the many attempts of early producers-and failures-,the birth,object and progress of Esperanto,being now the only officially (Government)recognised second or auxiliary language.After explaining the ease with which one may acquire it,holds conversations in Esperanto with son Virgil Jr,(14 year old),who began studying Esperanto in June of this year.Result:several South Carolinians who have listened-in have ordered textbooks-some have even sent'repeat'orders.Mr Dibble was an EANA Councillor "way back"in the days when the country was divided into Councillor districts. Good work,brothers Dibble-VIVU.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

Samideano Harry Hawker,New York,has just returned from a visit"way down yonder" in Australia,where he met and was entertained by the local Esperantsits,of the various cities visited.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

THE UNIVERSITY OF ILLINOIS (Urbana,Ill.)Esperanto club members were so eager to reach the ADVANCED ranks in Nia Afero,that they held classes in Esperanto all summer. They concluded the course (summer) with a"Kongresa Amuzafero"in honor of the 50th Jubilee celebration in Warsaw. Each guest took the role of a delegate from a foreign land,seated in the banquet hall of the restaurant " La Verda Stelo".Everyone-guests and waiters-speaking Esperanto.A floor show,with playlet singing and music. They are working for an Esperanto Exhibit in the University Library,also for new classes to be started at an early date.Sure they'll WIN.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

Nia Presidanto skribis: "Kiam mi forlasis Washingtonon je la 7-7-1937 mi tuj estis en tre varmega vetero,kaj ĝi daŭris dum la tuta vojaĝo ĝis la montoj de San Diego...kaj dum la tuta monato ĝis la 12.Aŭgusto ni ĉiam estis en temperaturo de pli ol 100°F. Kiam ni alvenis en la proksimeco de la Pacifika Oceano ni tuj estis en paradizo-temperaturo de 65°-75° kaj ni devis kovri nin dum la nokto"

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

ĈIU LOKO DEVAS HAVI DELEGITON.Se ne estas Delegito en via Urbo,Urbeto aŭ Vilaĝo, kaj vi estas preta,kaj kapabla tiel agi,bonvole sciigu la Centran Oficejon.

EVERY ESPERANTIST should read the works of Dr. Zamenhof - STANDARD for STYLE.
Descriptive booklet and price list free on request.
A New Reader: "El la Nebulo" by Chr. Hougaard. 24 pages. Excellent paper and strong cover. - 15 ¢ - prepaid.
American Esperanto Institute 1111 Brooke Rd. Rockford, Ill.

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER of EANA and IEL-& BRING IN A FRIEND

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

TEXTBOOKS.

"Practical Grammar" by Dr.Ivy Kellerman-Reed,member of the World Language Committee.Most popular textbook on the American market-many thousands used.. .75¢
"Step by Step in Esperanto",splendid for the self-instructor,paper 50¢,Clo.75¢
"Grammar and Commentary"by Maj-Gen.Cox-a classic in the textbook field,filled with examples in every way helpful to new or old students...............$1.00
Dr Szilagyi's "A Practical Course in Esperanto"-adapted for English-speaking countries by Fred Wadham,filled with amusing pictures to help one along....50¢
Simon and Volper "Esperanto Course"-its different,but good-12 lessons......10¢
Froding'Beginner's "Easy Course in Esperanto"10¢. American Key.............05¢
"THE ESPERANTO HOME-STUDENT"by James Robbie.9th edition(printed in July of this year).First class for either 'self' or class study.More than 50.000 sold...20¢
Millidge Dictionary(Esperanto-English),has no superior-not even a peer...$2.75
Fulcher & Long Dictionary (English-Esperanto).Fit companion to Millidge..$2.40
"EDINBURGH POCKET DICTIONARY",288 pages,4x6.Two way-English-Esperanto and Esperanto-English.Indispensible to any Esperantist.EVENTUALLY-why not NOW.$1.00
"Plena Vortaro"-all Esperanto.Essential to every advanced Esperantist.....$3.15
"Kompleta Gramatiko kaj VOrtfarado de Esperanto"Name tells the story......$1.70

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Easy,and interesting:Facila Legolibro,25¢. "Sub la Meznokta Suno"(Wendell),25¢.
Sep Ridoj (Wendell),25¢.Fabloj de Ezopo,25¢.Esperanto,its Aims and Claims" 20¢
Akrobato de nia Sinjorino(Payson).......25¢.Rakonto kaj Aventuro (Hall)....15¢
LANDO de ARĜENTA AKVO,(ROE-PAYSON)......15¢.Mopso de la Onklo(Chase) ......15¢
Blanche,Virgulino de Lille (Payson).....15¢.Taso de Amservo (Taylor-Weems) 25¢
La Karto Mistera-Tre intriganta.........25¢.Juneco kaj Amo,(Payson)Bds 25,p.15¢
Kiel Plaĉas Al Vi(Ivy Kellerman-Reed) 50¢.Miserere kaj Thais "...........25¢
Paper 50¢,Im.Leather 65¢ 35¢ & 50¢ 65¢.Radio Manuelo .................25¢
Surprises at Sylvia Farm (H W Fisher)...10¢.Piramo kaj Tizbeo (W G Adams)..10¢
Princ'Vanco(Putman kaj Beetes)..........25¢.Rozujo Ĉiumiljara (Wagnalls)...35¢
La Voje Returne (Remarque)............$2.00.Per Balono al la Poluso(Andre)$3.00
La Regno de l'Vero (Albert M.Koliner)....20.Versaĵetoj,40 pages of verse....15¢
THE HOLY BIBLE,Cloth $1.75.Morocco,India Paper,size 5 3/8 X 7 1/2,$3.25........
NEW TESTAMENT,Cloth,75¢.Leather,$1.25.Limp cloth,25¢.Persian Morocco, $1.75....

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

HAMANN'S ISPOGRAFIO LIBROJ:
Fundamento de Ispografio, 55¢. La baza libro,de ISPO aŭ Internacia Steno-Pazigtafio,kiu signifas internacia mallongskribo por ĉiuj kaj estas intencata farigi la dua skribo por ĉiuj,simile a Esperanto,la dua lingvo por ĉiuj.
Guide to English Ispography(for acquiring speed),60¢.Ŝlosilo de Esperanta Ispografio,10¢. Key to English Ispography 10¢. Clave de Ispografia Espanola,10¢. Schlussel der deutschen Ispografie,10¢.Correspondence Course in Ispography,books included,$2.00...............

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

"La KONGRESA LIBRO"-Ora Jubileo de Esperanto-1937,is a souviner that every Esperantist should have-and having it you will be very proud of it.It is a masterpiece of the printer's art,and the contents are worthy a place among the classics. Many are presenting this book to their City Libraries and Clubs-and nothing will be more appreciated as a gift,by the Esperantist friend.Postpaid for only 25¢

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

SUBSCRIPTIONS:"La Praktiko"all Esperanto.Instructive and amusing,per year $1.50
"Esperanto Internacia"monthly,all Esperanto,official organ of I E L " $1.50
"Heroldo de Esperanto"weekly, " " " " " " $3.85
"La Juna Vivo" monthly, " " ,Stories and lessons for children...$0.75
"British Esperantist" monthly,English and Esperanto(established 1903) $0.75

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Photographs of Dr Zamenhof,8x10,50¢.5x7,25¢;4x5 or Postcard size,10¢or 3 for 25¢
" " " " Postage stamp type(and size),12 for 25¢-50 for 75¢.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

Advertising rates. Small announcements 1¢ per word-minimum 25 words. 1x3 1/2 inch 50¢-3 insertions for $1.00.Full page $4.00.Send copy before 20th.

. . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . .

We take subscriptions for any magazine published-ask for club rates.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

Esperanto Association of North America.1517 H St.,n-w,Washington, D.C.

* * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * * *

*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*
**EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE E.A.N.A.------and BRING IN A NEW MEMBER.**
*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*